# LA DUA EPISTOLO ĜENERALA DE JOHANO

1 La presbitero al la elektita sinjorino kaj ŝiaj
infanoj, kiujn mi amas en la vero; kaj ne mi
sola, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj konas la veron; 2 pro la
vero restanta en ni, kaj ĝi estos ĉe ni por ĉiam:
3 Graco, kompato, paco, estos ĉe ni, de Dio, la
Patro, kaj de Jesuo Kristo, la Filo de la Patro, en
vero kaj amo.

4 Mi treege ĝojas, ke mi trovis iujn el viaj
infanoj iradantajn en la vero tiel same, kiel ni
ricevis ordonon de la Patro. 5 Kaj nun mi vin
petegas, sinjorino, skribante ne kvazaŭ novan
ordonon al vi, sed tiun, kiun ni havis de la
komenco, ke ni amu unu la alian. 6 Kaj jen
estas la amo: ke ni iradu laŭ Liaj ordonoj. Tio
estas la ordono, tiu sama, kiun vi aŭdis de
la komenco, ke vi iradu en ĝi. 7 Ĉar multaj
delogantoj eliris en la mondon, kiuj ne konfesas
Jesuon Kriston venantan en karno. Tio estas la
deloganto kaj la antikristo. 8 Gardu vin, ke vi ne
perdu viajn elfaritaĵojn, sed ke vi ricevu plenan
rekompencon. 9 Ĉiu, kiu iras antaŭen kaj ne
restas en la instruado de Kristo, ne havas Dion;
kiu restas en la instruado, tiu havas kaj la Patron
kaj la Filon. 10 Se iu al vi venas kaj ne kunportas
ĉi tiun instruadon, ne ricevu lin en la domon, kaj
al li ne donu salutan vorton; 11 ĉar kiu al li salute
parolas, tiu partoprenas en liaj malbonfaroj.

12 Havante multon por skribi al vi, mi ne volis
skribi per papero kaj inko; sed mi esperas veni
al vi kaj paroli vizaĝon kontraŭ vizaĝo, por ke
via ĝojo estu plena. 13 Salutas vin la infanoj de
via fratino, la elektita.

# Londona Biblio
## The Holy Bible in Esperanto (1910)

Public Domain

Language: Esperanto

2020-02-13

PDF generated using Haiola and XeLaTeX on 11 Nov 2022 from source files dated 13 Feb 2020
66d4141f-915d-52bc-b744-29459ca87515